




Boletín

Nº 424 Oktobro - Decembro 2018



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 424

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3^o, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrún

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Nova jaro, nova vivo, novaj projektoj, novaj revoj kaj multe da laboro en Esperantujo, ĉar en la urbo Malago okazos la plej originala “Triopa Kongreso”, t.e. IFEF, HEF kaj AEU: <http://esperanto-andalucia.info/> En nia paĝaro oni povas legi ĉion pri la eventoj, aliĝilo, ekskursoj kaj tre varia programero kun ekskursoj al Granado, Ronda, Antekero, Kordovo, Malago, Botanika Ĝardeno, ktp. Por fini la eventojn ni organizas ekskurson al norda Afriko. La restadejo estos komuna ĉe la “Dioceza Domo” kun komfortaj ĉambroj kaj bona menuo por faciligi al ĉiuj la eblecon ĉeesti aŭ partopreni la interesajn prelegojn, atelierojn, kursojn de Esperanto. specialan spektaklon “Vivu la Teatro” al kiu vi povas aliĝi kaj partopreni, kaj pliajn surprizojn kun flamenko, regiona muziko, ktp, ktp.

La jaro 2018 estis grava por la Movado en Hispanio, ĉar ni okazigis la ILEI Kongreson kune kun la Hispana en la Universitato de Madrido, kaj la sperto estis ege pozitiva, kaj de tiam ni pripensis la aferon okazigi novan eventon en Malago kune kun la Internacia Federacio de Esperantaj Fervojistoj kaj Andaluza Esperanto Unuiĝo. Vi konatiĝos kun Andaluzoj kaj kun la kulturo de la suda parto de Hispanio, kaj se tio ne sufiĉas, ni transiros al Afriko, ĉar la mondo devas scii ke Afriko ekzistas kaj preskaŭ tuŝas Eŭropon, sed bedaŭrinde ni ne tre okupiĝas pri la movado en la najbara kontinento. Mi vigligas vin aliĝi kiel eble plej baldaŭ por sperti la Triopan Kongreson, kiu eble neniam plu ripetiĝos.

La Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Fundación Esperanto (Informado pri 2018)	3
Belartaj Konkursoj de UEA 2019	4
Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono SAT 2019	5
Programo Erasmus Esperanto Komunikio	6
Pri Grupoj kaj Asocioj	7
Zamenhof-tago en Vélez Málaga (Andaluzio)	7
Zamenhof-Tago en Bilbao kaj Barcelono	8
Zamenhof-tago en Kantabrio	9
Zamenhof-tago en Ekstremaduro kaj Valencio	10
Zamenhof-tago en Madrido	12
Prelego pri Esperanto kaj ekzilo (Madrido)	12
Nova Asocio en Fuenlabrada (Madrido)	13
Zamenhof-tago en Seviljo	15
Internacia vespero en Tenerifo	15
Kunsido de bibliotekistoj en Lisbono	16
La nova Lingvofestivalo de Cheste	18
Partopreno de Hispanio en KAEST	21
Prelego pri katolika esperantisto	21
Universitata projekto pri Esperanto	22
Nekrologe	23
Forpasis poeto (Baldur Ragnarsson)	24
2019 Jaro de Federico García Lorca...	25
Ĵaku Ŝirai, la japana brigadano	29



KARAJ GELEGANTOJ, LA LIM-DATO POR ALIĜI AL LA TRIOPA KONGRESO DE MALAGO FINIĜIS LA 31AN DE DECEMBRO SED POR FACILIGI AL VI LA AFERON, NI DECIDIS PLILONGIGI ĜIN ĜIS LA 15A DE JANUARO DE 2019. BONVOLU ALIĜI KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ.

FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2018

La helpoj programitaj por 2018 estis anoncataj kaj publikigitaj en n-ro 420 de "Boletín" (okt-dec.2017, p. 5) de HEF.

Kiel sciате, ni disponas je modesta kvanto por helpoj. Sekve, ni decidis destini helpojn al nur du proponoj:

HEJS (Hispana Esperantista Junulara Societo): 200 €, pro organizado de IJK 2018.

Fuenlabrada Esperanto-Ligo: 200 €. Pro kreado de la grupo, organizo de kursoj kaj eventoj disvastigaj.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo en Zaragozo estis organizitaj E-kursoj.

PROJEKTOJ POR 2019

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2019.

2019 estos la 50a datreveno de Fundación Esperanto. Tial, eksterordinare la kvanto estos pli alta. Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 700 €.

Lorenzo Noguero
Sekretario de "Fundación Esperanto"



FUNDACIÓN
ESPERANTO

EN 2019 LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA ALVENAS AL SIA 70-A ELDONO

Jam aperis en Revuo Esperanto n-ro 11/2018 (novembro) kaj en la retejo <https://revuoesperanto.org/belartaj-konkursoj> la alvoko al la Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj en 2019 atingos sian 70-an okazigon. La konkursoj okazas ekde 1950 sub aŭspicio de UEA, kun la celo evoluigi la artojn en kaj pere de la internacia lingvo.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj por la venontjara eldono estas la 31-a de marto 2019, kaj la rezultojn oni anoncos kadre de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio (Finnlando). Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Prozo, subbranĉo mikronoveloj: (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio Paula Adúriz.

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵoj, subbranĉo monologoj (unupersonaj teatraĵoj) kaj skeĉoj (unu- aŭ diverspersonaj): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio María Cuevas.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2018. Aljuĝata estas nur unu premio.

Oni sendu po unu tajpita ekzemplero de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al la adreso: sciosfero@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu po unu ekzemplero de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj po tri ekzempleroj al Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj: en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵoj kaj Eseo: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €; Nova Talento 182 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la du subbranĉoj Mikronoveloj kaj Monologoj kaj skeĉoj po 125 €.

La Belartajn Konkursojn subtenas Belarta Fondaĵo de UEA. Pro tio ni varme invitas donacemulojn al kontribuo al Belarta Fondaĵo, kiu helpas diversigi kaj demokratiigi nian plej gravan kongreson. Manierojn mondonaci al tiu celo vi trovas ĉe: <https://uea.org/alighoj/donacoj> aŭ <https://uea.org/asocio/fondajhoj>.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne mistrafu la okazon facile kaj naturamike aliĝi per nia reta aliĝilo kaj helpi disvastigi tiun informon: https://uea.org/alighoj/uk_alighilo

Pli da informoj oni trovas en Revuo Esperanto n-ro 11/2018 (novembro) kaj en la retejo <https://revuoesperanto.org/belartaj-konkursoj>

Gazetara Komunikado

INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO EN BARCELONO EN 2019

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto de 2019, Barcelono iĝos denove (simbole) la *fajra rozo*.



ESPERANTO
92a SAT-KONGRESO
BARCELONO
4 - 11 aŭgusto 2019

Okazos tie la tiujara internacia kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, internacia laborista grupo, kies membroj havas Esperanton kiel komunikan lingvon.

La laborkunsidoj de la diversaj frakcioj de la asocio (liberecana, komunisma, liberpensula, ekologiisma, ktp.) estas malfermitaj al ĉiuj, sed nur

membroj havas voĉdonrajton. Aldone, la programo enhavas koncertojn, prelegojn, prezentojn de libroj (interalie de la nova eldono de la Plena Ilustrita Vortaro), ktp. Estos ankaŭ kursoj de diversaj niveloj por lerni kaj praktiki la internacian lingvon, kaj aliaj aktivaĵoj kiel vizito gvidata al Can Masdeu, la projekcio de la filmo *Tero kaj Libero* subtekstigita en Esperanto, aŭ debato kun la kamaradoj de la eldonejo *Calúmnia* pri la rolo de ĉi tiu lingvo en alternativaj eldonprojektoj.

La kongreso okazos en Martí Codolar, salezana gastejo, kiu lokiĝas en la kvartalo Horta. Krom lokaj esperantistoj, estas nun aliĝintaj homoj de Britio, Aŭstralio, Brazilo, Kanado, Koreio, Kongolando, Kubo, Finlandio, Francio, Italio, Portugalio, Serbio kaj Svislando.

Eblas trovi pli da informoj pri la programo en la retejo de SAT, en: <http://satesperanto.org/spip.php?article4200>. Oni povas aliĝi kaj kontakti la organizantojn ĉe: satbarcelona2019@gmail.com



PROGRAMO ERASMUS+ K1. ESPERANTO KOMUNIKO

La mezlernejo Almenara proponas disvolvi la projekton “Esperanto Komunikado” kadre de la Eŭropa programo Erasmus+ kiu malfermas vojon al la pliboniĝo kaj riĉiĝo de plurlingveco kaj la instruado de lingvoj, same kiel praktika respondo al la celo de Eŭropa civitaneco per profitado de la ĉeesto de diversnacidevenaj lernantoj. Ni devas fari profundan reflektadon pri la rolo de lingvoj en la nuna socio, ilia evoluo tra la historio, kaj ilia konsekvenco pri aspektoj tiel gravaj kiel kulturo, identeco, aŭ kreado, kaj pri valoroj tiel kiel toleremo, respekto al la aliaj per la disvolviĝo de ambaŭflanka enriĉiĝo pere de lokaj kaj eksterlokaj lernantoj tiamaniere ke ĉiuj lernu kaj riĉiĝu unu la alian.

Per tiu ĉi projekto ni volas:

- Doti al instruistaro novajn pedagogiajn ilojn por plibonigi ties instrupraktikon.
- Ampleksigi la kulturen, lingvan, kaj edukadajn ofertojn en la centro.
- Akceli kaj disvolvi la koncepton de Eŭropa civitaneco inter la lernantaro per kultura kaj lingva interŝanĝo, kaj la internacia kunlaboro inter mezlernejoj el diversaj Eŭropaj landoj per Esperanto.
- Akceli la interkulturen dialogon stimulantan la kondon de aliaj kulturaj, lingvaj kaj sociaj realoj.
- Akceli la respekton kaj la toleradon al aliaj kulturoj kaj mondrealoj per la kono kaj komunikado pere de Esperanto, internacia lingvo kies uzado kaj instruado estas oficiale rekomendita de UNESKO, lingvo kiu nuntempe posedas pli ol du milionoj da parolantoj en la tuta mondo.
- Batali kontraŭ iaspeca diskriminado, rasismo, ksenofobio, socia malinkludo kaŭze de etnaj, lingvaj, aŭ kulturaj aferoj; tiucele uzi neŭtralan lingvon elpensita por internacia komunikado.
- Faciligi kaj akceli la lernadon de fremdaj lingvoj inter la lernantaro dank'al studo de Esperanto.
- Doni al lernantaro lertan, simplan, kaj efikan komunikadon kiu permesu kulturen interŝanĝon kun alilandaj kaj alikulturaj homoj.
- Aliri al riĉega kaj vasta originala kaj tradukita esperanta literaturo kaj ĝui ĝian eksterordinarajn kreaĵojn aperitajn dum pli ol 120 jaroj de historio.
- Promociajn kaj viglajn la idealojn de toleremo, pacismo, inkludado, dialogo kaj respekto inter ĉiuj popoloj kaj lingvoj de la mondo, samidealajn de esperantismo, unua pacisma socia movado en la historio de Eŭropo.

A. Fabián Jiménez

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

MALAGO

ZAMENHOF TAGO EN VÉLEZ MALAGA



Profitante klas-tagon, la 14-an de decembro ni profitis celebri la Zamenhof-feston ĉe la lernejo Almenara en la urbeto Vélez Málaga. Carlos Spinola, Juan García del Río kaj Ángel Arquillos, nuntempe membroj de la LKK por la venonta trikongreso okazonta en majo 2019, kune kun paro da geamikoj el Slovenio kaj Rusio, kiuj nuntempe ferias en Benalmádena, okazigis gajan Zamenhof-feston kun matenmanĝo komuna ĉe la manĝejo de la lernejo, hiso de la

esperanta flago kaj prelego pri Scienco gvidata de Carlos Spinola kaj prelego pri Literaturo de Esperanto, gvidata de Ángel Arquillos.

Pli ol tri horoj da esperanta etoso babilante kun kelkaj scivoluloj pri la internacia lingvo

tre rapide pasis, kaj ni promesis ripeti la sperton ne nur por respondi demandojn, sed por babili esperante kun ili, ĉar inter la geinstrusitoj, kelkaj klopodis respondi kaj demandi en Esperanto kun sukceso.



Sur la muroj de la koridoroj kaj halo pendis dekoj da desegnaĵoj pri Esperanto kiel vi povas konstati per la fotoj kaj eĉ sur la vitroj de kelkaj fenestroj estis algluitaj verdaj steloj. Kiel dirite la sperto estis alte pozitiva kaj ni daŭre kunlaboros kun Fabián, la respondeculo de la

klaso de Esperanto en la Lernejo, ĉar grupo da geprofesoroj ne nur lernas la lingvon, ili kunlaboras kun Fabián en la projekto Programo Erasmus + K1 Esperanto Komunikado, per kiu ili laboras, kaj vi povas legi raporton en ĉi bulteno.

Bilbao

Zamenhof-festotago

La 15an de decembro, kiel kutime, ni kunvenis por celebri la Z-festotagon. Krom komuna manĝo, estis du prelegoj:

Paco López prelegis pri podkastoĵoj kaj ĝia utiligado en la lernado de Esperanto.



José Ignacio Orejas prelegis pri la rilatoj inter Esperanto kaj la laborista movado, precipe anarkiisma, en Bizkajo.

Sur la foto

Staras: Octavio Gutiérrez (voĉdonanto), Jesús M. García (sekretario) kaj David Redondo (vicprezidanto).

Sidas: Teodoro Ibáñez (voĉdonanto), Iciar Arteche (kasistino) kaj Paco López (prezidanto).

Jesús G. Iturrioz

Barcelono

Zamenhof-tago

Ĉi-jare, mi, kiel prizorganto de Biblioteko Juan Régulo Pérez, estis invitita de Kataluna Esperanto-Asocio celebri la Zamenhof-tagon en Barcelono.

Niaj katalunaj samideanoj decidis soleni la feston en la sidejo de Biblioteko Petro Nuez, ĉe la Centro de Esperanto de Sabadell, kie ĝi troviĝas, por prezenti ĝin kaj diskonigi ĝian ekziston. Al la programo mi kontribuis per du prelegoj, unu pri Biblioteko Juan Régulo Pérez kaj la alia pri Bitoteko. Tie mi povis ĝuis la prelegon de Ana María Molera pri la Esperanto-Biblioteko Ramon Molera Pedrals (Moià), gravega institucio en la kultura mondo de Esperanto pro sia ampleksa kolekto de ĉiaspecaj periodaĵoj, kaj la prezenton de Brian Rusell pri projekto de kooperativa skanilo, interreto kaj kopirajtoj. Bedaŭrinde, mi maltrafis la prelegon de Rubén Fernández pri Biblioteko-Arĥivo Petro Nuez (Sabadell) kaj la kolekto de Grupo Aŭroro (Barcelono), kiujn li prizorgas, ĉar ĝi okazis ne la 15an, sed la 16an de decembro, kaj ĝi koincidis kun mia revenflugo.

Mi elkore gratulas la organizantojn pro ilia iniciato soleni la Zamenhof-tagon per tiuspeca omaĝo al la Esperanto-bibliotekoj, tiel intime ligitaj al nia kulturo. Havi la ŝancon ĉeesti ĝin estis por mi, ĉiusence, vera plezuro.

Ana Manero

Kantabrio

Zamenhof-tago

La 15an de decembro, 28 kantabroj partoprenis la komunan manĝon organizitan de KantEA en Santander por festi la Zamenhof-tagon (tagon de la libro en Esperanto).



KantEA

Du tagojn antaŭe, la 13an de decembro, la lernantoj aranĝis festeton en la sidejo de KantEA por kune trinki ĉampanon, manĝi ĉokoladbombonojn kaj kanti en Esperanto.

Por spekti videon pri la festo kaj la kantado, vizitu la jutuban kanalon de Asociación Cántabra de Esperanto, aŭ iru rekte al la filmo per jena ligilo: <https://youtu.be/4sWHaGvNHjg>.

Teruelo

Zamenhof-tago

La membroj de LIBERANIMO festenis la Zamenhof-Tagon la 17an de decembro.

Ni faris nian jaran kunvenon, vespermanĝis, trinki, kantis, ktp.

La raporto kaj foto aperis en la “Ĵurnalo de Teruelo”. Vidu apude.

Liberanimo

Zaragoza

Zamenhof-Tago

La frateca tagmanĝo okazis la 15an de decembro. Krome, la 18an okazis tre interesa celebrazo en nia sidejo. Unue Pablo Conesa faris allogan prezenton de kurioza temo: "Esperantaj teritorioj". Li parolis pri lokoj kie Esperanto estis deklarita oficiala lingvo, nome: Neŭtrala Moresnet (aŭ Amikejo), Insulo de la Rozoj kaj Princlando de rivero Hutt. Post la prelego, ni tostis je nia sano kaj je Frateco kaj amike babilis kaj manĝetis ĉiuj kune. Fine oni deziris unu al la alia feliĉajn Kristnaskajn festojn kaj bondezirojn je la venonta jaro 2019 kaj adiaŭis nin ĝis la 8an de januaro. Pliaj informoj kaj fotoj aperas en la retejo de Frateco.

Lorenzo Noguero



Liberanimo celebra el 'Zamenhofa tago'

La Asociación de Esperantistas Teruelenses Liberanimo celebró la pasadica aniversario un encuentro con motivo del Zamenhofa Tago, el día Zamenhof, que se celebra en todos los municipios de cada 15 de diciembre en conmemoración del nacimiento, en 1859, del etimólogo polaco creador del esperanto.

Una acción de la agrupación teruelense evolutiva pretende celebrar las actividades de este año, destacando el curso presencial de espe-

ranza de la Escuela de Adultos y el curso online de la ORELE, nivel A2. Una celebración hecha en los que Liberanimo quiere tener presencia con el Consejo Nacional de Idiomas, en mayo, y el Mundial de Palencia, el 30 de julio.

Ekstremaduro

Zamenhof-tago



Por la unua fojo oni celebris la Zamenhofan Tagon en Ekstremaduro, nome en Don Benito, iom centra por ke la malmultaj disaj esperantistoj povu kunveni. Estis rendezuo en restoracio, kie oni tagmanĝis vegetarane, oni kafumis, babiladis “ĝis la nokto noktofin”. Inter alie oni konsideris fondita la regiona grupo de HEF

en Ekstremaduro nome BONEGE.

Tiu nomo egalas al Ĉu Bofrata Organizo? Ne: Ekstremadura Grupo de Esperantistoj. Kaj ni povas ĵuri, ke ni apenaŭ drinkis alkoholaĵojn. Krome ni planis diversajn eblojn por iompostioma agado en la regiono, nome pliaktivigo de la grupeto de Cáceres, venontaj renkontiĝoj, eventualaj planoj por pli ampleksaj alvokoj ktp. Ni plue informos.

Kani

Valencio

Zamenhof-tago



Pasintan sabaton, la 15an de decembro, la grupo Esperanto de Valencio okazigis sian Zam-tagon, je du partoj:

Unue, ĉe la grupejo, Elías Hernández prelegis pri simpla aritmetiko (kiel adicii, subtrahi, multipliki aŭ obliĝi, dividi aŭ onigi, potencigi kaj radikigi) per Esperanto, kaj Dennis poste ankaŭ prelegis pri sia unu-monata vojaĝo en Francio.

Due, la ĉeestantaro (ĉirkaŭ 15 geesperantistoj) kunvenis ĉe abunda kaj agrabla tablo en proksima restoracio.

MADRIDO

FOIRO DE SOLIDARA EKONOMIO



Madrida Esperanto-Liceo partoprenis en la Foiro de Solidara Ekonomio, kiu por la sesa fojo okazis la tagojn 22an kaj 23an de septembro, sabaton kaj dimanĉon. MEL disponis je budo, en kiu oni montris kaj vendis diversan materialon pri Esperanto kaj oni povis informi pri la lingvo. Dum la tuta semajnfino, miloj da vizitantoj vidis nian tablon kaj panelojn montrantaj informilojn kaj librojn por lerni Esperanton.

Krome, oni programis diversajn kromajn aktivadojn, inter kiuj debaton pri “La cuestión del idioma en la comunicación internacional”, kiu gvidis Félix Jiménez nome de MEL.

EŬROPA SEMAJNO DE LA LINGVOJ

Fine de septembro oni festis en Madrido la Eŭropan Semajnon de la Lingvoj, organizi-



tan de la asocio de institutoj por lingvoj EUNIC, profitante la Tagon de la Lingvoj lanĉitan de la Konsilio de Eŭropo. En tiu ĉi jaro oni denove invitis Hispanan Esperanto-Federacion. Ni partoprenis interŝanĝon de lingvoj la vendredon, 28an de septembro, laŭ modelo nomata “speakdating”, en kiu

12 lingvoj prezentiĝis al individuaj interesitoj dum po 5 minutoj, Pri Esperanto okupiĝis Félix Jiménez, kiu sukcesis interesigi multajn partoprenantojn de ĉiuj aĝoj.

ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

Por la Internacia Tago de Esperanto, la 15an de decembro Madrida Esperanto-Liceo organizis aktivadon por celebri la esperantan kulturon, en la kultura centro Centro Sociocultural Mariano Muñoz en kvartalo Usera.

Post bonveno kaj inaŭguro, ĉeestantoj kunmemoris la 70an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj per laŭtleĝo de kelkaj artikoloj. Poste okazis donacado de materialo de malnova membro de HEF al la Biblioteko Juan Régulo (vidu apartan artikolon).

Dum la tago prelegis la profesoro pri sociologio Roberto Garvía parolos pri: *La diversidad en el movimiento esperantista* (hispanlingve), Félix Jiménez Lobo pri: *La ĝisnuna sperto de la UNED-Kurso* (esperante), Toño del Barrio pri: *Serĉante framasonojn inter esperantistoj kaj esperantistojn inter framasonoj*. Poste Miguel Fernández prezentis siajn novajn librojn: *Ha, Carmela* (traduko de verko de José Sanchis Sinisterra), *Revene* (originala poezio), *Kio estas anarkiismo* (dulingva libreto). Post komuna tagmanĝo, Pedro Hernández gvidis praktikan lecionon de antikva meza egipta lingvo. Dum la tago oni disponis libroservon.

PRELEGO PRI ESPERANTO KAJ EKZILO

La 26an de novembro, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, estis invitita de la Asocio de Idoj de la Hispana Ekzilo prelegi ĉe la universitato UNED, en la sidejo nomata Escuelas Pías, historia konstruaĵo en la madrida kvartalo Lavapiés, pri “Esperanto, en la Dua Respubliko, en prizono kaj en ekzilo”. Li rakontis pri la historio de Esperanto, la aktivadoj disvolvitaj dum la periodo de la 30aj jaroj, kaj la okazintaĵoj dum la civila milito kaj la postaj jaroj.



La prelegon ĉeestis, krom esperantistoj, ankaŭ anoj de la asocio kaj aliaj interesitoj. Unu el la ĉeestantoj rakontis ke lia patro mem lernis Esperanton en la malliberejoj, kaj ke li poste uzis ĝin por korespondi kun alilandaj esperantistoj, inter alie iuj el la Orienta Eŭropo. Li montris sian pretecon donaci la konservitan materialon al HEF



Tion ni konkretigis dum la celebrado de la Zamenhof-Tago en Madrido, la 15an de decembro. La filo, Valentín Ladrero Martín, donacis diversajn librojn kaj lernilojn, kaj ankaŭ la atestilon de la patro, Valentín Ladrero de Santos, kiel membro fondinto de Hispana Esperanto-Federacio, kun numero 40. Li publike elstarigis la rolon de Esperan-

to en la vivo de lia patro, kaj la fenestron malfermitan al la mondo, kaj bedaŭris ke li mem ne lernis funde la lingvon. Poste, la prezidanto de la Asocio, Pilar Novo, faris paroladeton por substreki la gravecon konservi la memoron, ne nur por la historiistoj, sed ankaŭ pro la tuta civitanaro. La dokumentoj estis akceptitaj de la prezidanto de HEF, kiu dankis publike la malavarecon de Valentín; ili estos konservitaj en la Biblioteko Juan Régulo Pérez.



NOVA ASOCIO EN FUENLABRADO

La 16an de oktobro prezentiĝis nova esperantista grupo en la urbo Fuenlabrada, de la madrida regiono. Ĝi ricevis la nomon de Fuenlabrada Esperanto-Ligo. La prezento okazis en la sidejo de la Oficiala Lingvolernejo (E.O.I.) de tiu urbo, kie jam de la pasinta jaro okazas kurso de Esperanto, kiu estis la ĝermo de la nova grupo.

La prezentadon gvidis la lanĉintoj de la grupo. Ĉeestis ankaŭ la prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio kaj de Madrida Esperanto-Liceo.

La agado taŭgis ankaŭ kiel prezento de la nova kurso kiu komenciĝis je la sekva semajno en tiu sama Lingvo-lernejo EOI (strato Islandia, 1). Ĝi estos instruata ĉiujn mardojn ĝis la 29a de januaro 2019, de 17:00 ĝis 18.30, je baza nivelo,



La grupo jam estas kontaktebla per provizora retejo <http://esperanto.es/fel/> kaj per la retadreso fuenlabrada@esperanto.es. La prezidanto estas Isidoro Ortega, kiu nuntempe estas la vicurbestro kaj urbkonsilisto pri edukado de la municipo.

Pri la prezento kaj la kurso informis la sudmadrída radiostacio de la Cadena SER kaj la loka retportalo [Fuenlabradanoticias.com](http://fuenlabradanoticias.com).

Krome, la grupo organizis ekspozicion pri Esperanto, kiu estos montrata inter la 15a de decembro kaj 8a de januaro 2019 en la sidejo de la municipa oficejo de la kvartalo Loranca.



Ĝi estis akompanata de inaŭgura prelego la 17an de decembro, kiun gvidis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto Federacio, Isidoro Ortega, prezidanto de la Fuenlabrada Esperanto-Ligo, kaj Carmen Seco, magistratano prezidanto de la distrikto.

FESTADO DE LA ZAMENHOFA-TAGO EN SEVILO.



Kiel kutime en lastaj multaj jaroj, ASE (Sevila Esperanto Asocio) celebris la Zamenhof-tagon per manĝado (ĉi foje, restoracio en urbocentra mangejo ĉe Plaza de la Gavidia).

Tamen ĝi okazis la 14an de decembro (kelkaj tamen povis festeni ankaŭ la 15-an aliloke).

Fine de ĝi okazis festparolo pri tia tago.

Kiel kutime, la Vicprezidantino regalis la ĉeestantojn (ne ĉiuj el kiuj estis grupanoj) per eta memoraĵo.

INTERNACIA VESPERO EN TENERIFO



Ne estas malofte, ke dum la taŭga sezono por turismo en Kanarioj (de novembro ĝis aprilo, proksimume) nin vizitas kelkaj esperantistoj. La hazardo igis la renkontiĝon de pasinta 5a de decembro vere internacia, kun la koincido de franca samideano Frederick, el Lion, kuraĝulo kiu antaŭ

kelkaj monatoj biciklis ĝis la bazo de la monto Tejdo (ĉ. 2300 m) kaj niaj slovenaj geomikoj S-rino Ferrer Hervás kaj ŝia edzo Janez, el Ljubljano. Ankaŭ aperas en la foto veteranoj de la tenerifa E-movado, kiel A. Ferrer Hervás, A. Benítez kaj L. Trujillo (staranta). Fotis nia kasisto J. L. Cruz


KUNSIDO DE BIBLIOTEKISTOJ EN LISBONO



Jam de longe la komunumo de prizorgantoj de Esperanto-bibliotekoj revas pri la kreado de komuna katalogo. La afero tre komplikas, ĉar ĝi postulas grandan kunordigon pri diversaj temoj. Inter ili, decidi kiun katalogon regularon aŭ kiun klasifikan sistemon uzi. Cetere, ĉiu biblioteko havas malsamajn bezonojn kaj tre malsimilajn eblojn. Tial labori laŭ komunaj kriterioj signifas titanan taskon preskaŭ nerealigeblan.

Mi vidas la solvon en la kreado, ne de vera komuna katalogo dividanta komunan datenbankon, sed en la kreado de "virtuala" komuna katalogo. Tio signifas, ke ne necesos interkonsento pri normoj, regularoj aŭ labormetodoj. Ĉiu biblioteko aŭ grupo de bibliotekoj povos plu uzi tiujn jam uzatajn laŭkutime kaj tio ne kaŭzos problemojn pri koherco ĉar fakte ne ekzistas komuna datenbanko. La "virtuala komuna katalogo" kreiĝos ĉiufoje kiel rezulto de serĉado per la komuna serĉilo kaj ĉio estos multe pli fleksibla. Kie staras, do, la problemo? En tio, ke oni devas specife krei la komunan serĉilon. Kaj temas ne pri bibliotekista, sed pri informadikista laboro.

Siatempo, mi proponis ĉi solvon en la diskutlisto de prizorgantoj de Esperanto-bibliotekoj, sed diskutlisto ne taŭgas kiel laborilo kaj malfacilis klare montri la ideon. Ĉeestaj laborkunsidoj foje nepras. Kaj ĉiuj scias, ke pli elokventas unu bildo ol mil vortoj... Mi, do, decidis partopreni la ĉi-jaran kunsidon de bibliotekistoj kadre la Lisbona UK, por pli bone klarigi mian proponon.



Temis pri tre interesa kunsido, dum kiu post la analizado de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la diversaj opcioj por krei komunan katalogon, oni fine decidis, kun la teknika helpo de E@I la eventuala financa apogo de Esperantic Studies Foundation (ESF), eklabori cele al la kreado de “virtuala katalogo” surbaze de komuna serĉilo.

Tio signifas, ke ĉiu biblioteko laboros sendepende sed kun la etleco interŝanĝi rikordojn kun la aliaj. La virtuala katalogo prezentos aleksteran serĉinterfacon por la uzo de esploristoj, nome, unikan alirpunkton por samtempe konsulti ĉiujn bibliotekojn.

Por tiuj bibliotekaj prizorgantoj, kiuj ne havas teknikajn konojn por mem starigi sian sistemon, E@I provizos helpon. Ankaŭ estos helpiloj por la kataloga flanko, kaze ke amatoraj prizorgantoj bezonos ĝin.

La projekto ekmarŝis. Peter Baláž (E@I) preparas dokumentojn por peti subvencion al ESF. Orlando Raola (UEA) superrigardas la aferon. Mi alportas mian sableron per verkado de dokumentoj en rilato al la kataloga flanko... Ĉu eblas baldaŭ anonci la ĝermon de tiu virtuala katalogo? Mi senpacience atendas ...

Ana Manero

Bibliotekisto de HEF

La Nova Lingva Festivalo de Cheste Eta Ekpaŝo, sed Multflanka Sukceso

En la komenco de aŭtuno, Esperantistoj de la Regiono Valencio lanĉis publikan Lingvan Festivalon en la iam fama “Esperanto-vilaĝo” de Cheste (ĉirkaŭ 8000 loĝantoj), 30 kilometrojn norde de la urbo Valencio. Dek ok lingvoj estis prezentitaj en 44 fulmo-kursetoj kiuj daŭris nur 40 minutojn. Kelkaj lingvoj prezentiĝis nur unufoje, kelkaj plurfoje, kaj Esperanto sesfoje.

La Festivalo okazis sabate, la 22an de septembro, komenciĝante je la 10a matene kaj finiĝante je la 8a vespere. Ĉiuhore en kvin klasĉambroj, kun kapacito inter 9 kaj 25 sidlokoj, de tri ĝis kvin el la dek ok lingvoj prezentiĝis: la angla, araba, aymara, berbera, bulgara, ĉina, la chestana (parolmaniero de la lokanoj), esperanto, franca, greka, itala, japana, latina, pola, rumana, rusa, ukrania, kaj la valencia.

La ĉeestantaro de la Lingva Festivalo ne estis tre multnombra, kun nur 167 homoj kiuj elektadis lecionojn de la dek ok lingvoj, tamen la urbodomo, la lingvo-prezantoj, kaj la gelernantoj estis tre kontentaj pri la rezultoj. La urbodomo jam pripensas duan eldonon de la Festivalo en la venonta jaro. Ĉi jare la Festivalo devis okazi en Septembro – ne favora monato en Cheste pro tio, ke la Plenkreskula Lernejo ankoraŭ ne komencis sian normalan lernejaron. En 2019, la dato probable estos multe pli bona.

La enhavo de la kursetoj variis laŭ la lingvo kaj laŭ la emo de la instruantoj, sed multaj uzis la simplan prezentomanieron kiun Dennis Keefe nedevige proponis en siaj kvin trejnado-sesioj: 1) Parolado en la lingvo mem, 2) priskibo de la geografio de la lingvo, 3) priskribo de la lingvo-familio de la prezentota lingvo, 4) iom da gramatiko 5) iom da simplaj, interesaj frazoj, 6) la frazo: Mi amas vin, 7) iom da tempo por demandoj de la gelernantoj, kaj 8) informo pri kie oni poste povas lerni la lingvon (ĉe-este, rete).



La respondecoj de la Lingva Festivalo dividiĝis en pluraj partoj. La Esperantistoj zorgis pri la trovado de lingvo-instruantoj, la trejnado de tiuj instruantoj, la organizado de la horaro, la statistikumado, kaj la bonvenigon al gelernantoj. La urbodomo, aliflanke, zorgis pri ĉiaj kostoj, la lernejo, kaj la informado por varbi ĉeestantojn. Sen la helpo de la lokaj Esperantistoj de Ches-

te kaj la laboro de Rosa Zanon Ferrando, aktiva Esperantistino de Cheste, estus malfacile organizi tian sukcesan Festivalon. Surloka laboro nepras.

La esperantaj kursetoj meritas specialan atenton. Entute estis 10 prezentadoj antaŭplanitaj, unu por ĉiu horo inter la 10a kaj la 19a, ĉiuj por tutnovaj lernantoj, sed nur ses el tiuj 10 okazis, pro manko de gelnantoj. Tamen, entute ĉeestis 24 homoj la fulmkursojn pri Esperanto, la plej alta kvanto de la dek ok lingvoj.



Kvin Esperantistoj partoprenis kiel prezentantoj de Esperanto: Rikardo García Tarin, Elias Hernandez Capdevilla, José Añó Belda, Jaume kaj Dennis. Tia maniero prezenti Esperanton sekvas la modelon uzatan en Nankino, Ĉinio, kie Esperantistoj

Aŭgusto Casquero (nun loĝanta en Valencio), Michel Fontaine kaj Peng Zhemin gvidadis ĉirkaŭ dudek fulmkursojn pri la Internacia Lingvo tra dutaga periodo.

La Lingva Festivalo sukcesis laŭ pluraj vidpunktoj. Unue, ĝi projekte kunigis du esperantajn grupojn, tiun de Valencio kaj tiun de Ceste (Lum Radio). Tio venontece povas eventualaj duolingvaj aktivaĵoj en la Regiono Valencio.



Kvare, loka lernejo, pro la Lingva Festivalo, poste invitis nin prezenti Esperanton dum internacia tago de tiu mezlernejo. Pli ol 60 mezlernejanoj tiamaniere ekvidis por la unua fojo la Internacian Lingvon.

Kvine, kaj surprize, la Plenkreskula Lernejo de Ceste invitis nin doni multmonatan kurson pri Esperanto! Nova, publika kurso naskiĝas en Ceste! Tio estas grava paŝo por la kreskigo de Esperanto en tiu urbeta de okmil loĝantoj en la mezo de oranĝo- kaj vinberokampoj.



La Lingva Festivalo de Cheste estis sufiĉe sukcese por nun pripeni pli ampleksan strategion por la Regiono Valencio. Eblas eventuale stariĝi tri Festivalojn en la valencia areo: Cheste, kiu nun iĝas ĉiujara evento; Cullera, kiel venonta bazo de loka kaj turista agado; kaj Valencio, kiel grandega Festivalo kun celo atingi 100 lingvojn kaj internacian famon en periodo de kvin

jaroj.

Ankaŭ eblas pripenis disvastigi la Lingvan Festivalon al aliaj urbetoj, urboj kaj urbegoj de Hispanio, utiligante SIMPLAN modelon de la evento. Tio estas, limigi la Festivalon al lingvoj nur. Nur lingvoj – ne muziko, nek dancado, nek folkloro. Nur lingvoj. La plej daŭripovaj kaj sukcesaj Lingvaj Festivaloj faras ĝuste tion: Rusio, Francio, Ĉinio, Anglio. . . .

La Esperantistoj de Valencio kaj de Cheste povas iom fieri pri sia laboro kiu sukcese lanĉis la unuan publikan Lingvan Festivalon en ĉi tiu parto de la mondo. Estas klare al la urbodomo de Cheste kiuj estas la motoroj en la Festivalo: la Esperantistoj.

Dank' al la urbodomo kaj dank' al la individuaj Esperantistoj kiuj ĉi foje laboris antaŭ kaj dum la Festivalo: Rosa Zanon Ferrando, José Manzanera Sapena, Luis Salag, Elias Hernandez Capdevila, Dennis Keefe, Angelita Garcia, María-Angeles Corberán, Ricardo Garía Tarin, José Añó Belda, Jaume, Adolf, Isabel, Jaime, Michel kaj Pilar.

Dennis Keefe
Esperanto-Plaĝo
Cullera, Hispanio



Dennis Keefe

PARTOPRENO DE HISPANIO EN KAEST



Juna, scienca kaj egaleca agado. KAEST estas la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. Ĝi okazas ĉiun duan jaron kaj enhavas prelegojn, diskutojn kaj aliajn aktivajn. La celo estas zorgi pri la evoluo de la faka vivo en Esperanto.

Ĉikaze KAEST okazis en Modra, Slovakio, de la 18a ĝis la 21a de oktobro. Hispanaj esperantistoj estis reprezentitaj per du prelegoj de du Carlos: Carlos Spinola el Malago kiu parolis pri planeda scienco, kaj Carlos Pesquera el Santandero, kiu proponis novan sociologian Esperantan esploron. Ankaŭ du junuloj partoprenis, William Guerrero kiel prezidanto de HEJS, la junulara sekcio de HEF, kaj Irene Spinola.

La junulara partopreno okazis danke al projekto eŭropa pri egaleco, kiu disvolviĝis kadre de la Konferenco. Tiu estis la antaŭlasta etapo de la projekto. Oni organizis la lastajn taskojn kiuj estos inkluzivitaj en raporto kiun oni finpretigos dum la Junulara Esperanto-Semajno (JES), vintra renkontiĝo apud Berlino.

PRELEGO PRI KATOLIKA ESPERANTISTO

La ĵaŭdon 29an de novembro, profesoro Roberto Garvía, de la Universitato Carlos III, parolados pri “Katolikismo kaj Esperanto; konverĝoj”, sine de seminario “Tito Brandsma, atestanto de espero”, dediĉita al tiu nederlanda karmelitano, esperantisto, murdita de la nazioj kaj beatigita de la katolika Eklezio.



UNIVERSITATA PROJEKTO PRI ESPERANTO

Juna studento de magistra kurso pri Multmedia Ĵurnalismo en la Madrida Universitato "Complutense", Patricia Merello, kreis multmedian projekton pri Esperanto, kiel baza parto de sia akademia aktivado, kun la titolo "El sueño de Zamenhof" (La revo de Zamenhof).

Temas ĉefe pri blogo <https://lalenguadezamenhof.wordpress.com/> kiu celas montri la ĉefajn kulturajn esperantistajn agadojn kreitajn en Madrido, plus diversajn aspektojn de la historio de la lingvo en Hispanio. Ĝi estas redaktita en la hispana lingvo, por disvastigi la aktivadojn en la komunumoj kiuj ankoraŭ ne konas la ekziston de la esperantista movado. Ĝi do havas disvastigan celon, krom edukon kaj kulturan. Ĝi krome serĉas la malkovron de la internaĵoj de nevidebla realaĵo, kaj invitas pripensi pri la internacia komunikado kaj la lingva dominado.

La blogo havas multmedian karakteron, uzante videon, tekstojn, aŭ materialon, bildojn aŭ hiperligilojn, kaj konsistas el sep sekcioj: la movado, eroj de la historio, la rifuĝejo de la literaturo, universalaj melodioj, en la praktiko, voĉoj, kaj famaj sekvintoj.



Krome, la projekto estas disvastigita pere de la sociaj retoj, Twitter kaj Facebook, kun la celo krei renkontiĝejon inter esperantistoj kaj ne esperantistoj.

Patricia jam en la pasinta jaro dediĉis al Esperanto la laboraĵojn por siaj ĵurnalistaj studoj (TFG) en la Universitato de Seviljo. Ili estas konsultebaj en la retejo de la Universitato, kun la respektivaj titoloj "El esperanto en los medios periodísticos: una aproximación a la historia del movimiento esperantista en España (1898-1939)" kaj "El legado de Zamenhof: proyecto hipermedia".

NEKROLOGE

RODOLFO CANET MARÍN (1929 - 2018)

Ni devas informi pri la forpaso de nia amiko Rodolfo Canet. La pasintan 22an de novembro, tiu demultjara esperantisto forlasis nin.



Ŝtatoficisto en la haveno de Alicante, li esperantiĝis en 1950 kaj de tiam li restis fidele al nia afero. En 1956 antaŭ la mikrofono de radio Alicante li propagandis pri la lernebleco de la internacia lingvo kaj la homaranaj valoroj de Esperanto. Kune al aliaj lokaj esperantistoj li organizis kampanjon por disvastigi la lingvon en la urbo kaj en la jaro 1967 ili sukcesis krei la Grupon Esperanto de Alicante.

Membro de HEF kaj delegito de UEA dum pli ol kvindek jaroj, en 1971 li tre aktive partoprenis en la organizado de la 31a HEF-kongreso en Alicante kiel prezidanto de la Grupo de Alicante kaj ankaŭ de la LKK.

Li partoprenis en kelkaj internaciaj kongresoj, en multaj HEF-kongresoj kaj en ĉiuj la valenciaj kongresoj kaj renkontiĝoj ĝis kiam lia sano tion ne plu permesis.

Ankaŭ kunfondinto de la Valencia-Murcia Esperanto Federacio kaj ĉiam estrarano de la Grupo Esperanto de Alicante, li alportis stabiĝon kaj kontinuecon al la loka movado.

Rimarkinda estas lia laboro kiel filatelisto. Fakulo pri la esperanta temo, lia ampleksa filatela kolekto pri Esperanto estis montrita en diversaj ekspozicioj.

Pace ripozu.

FORPISIS POETO BALDUR RAGNARSSON



RAGNARSSON, Baldur. 1930-2018. Islandano; instruisto, lerneja ĉefinspektoro. Ano de Verkista Asocio de Islando. Verkis islandlingve poemlibrojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. Lernis Esperanton kiel gimnaziano en 1949. Aktivas movade (lande kaj internacie) ekde 1952. Prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio dum multaj jaroj. Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1975-85. Akademiano ekde 1979. Estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko 1980-86. Vicprezidanto de UEA 1980-83. LKK-prezidanto de la Rejkjavika UK (1977). Redakciano de Norda Prismo 1958-1974. "Arĝenta sprono de KO-KO" pro originala verkado 1964.

Kiel poeto, aktivulo pri la E-kulturo kaj aktuala Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA, preziditaj de la ĵus forpasinta eminenta bardo Baldur Ragnarsson de 1975 ĝis 1985, mi, propranome kaj nome de la BK-Sekretario, Miguel Gutiérrez, deziras esprimi plej profundan kaj sinceran kondolencon al la familianoj de nia admirata islanda majstro kaj al la tuta mondo de la E-poezio pro la perdo de tiel escepta lirikisto kaj homo.

Feliĉe, grandaj poetoj kiel Baldur Ragnarsson per siaj versoj certe sin transvivas.

Tuŝita de ĉi konsolo, malgraŭ la doloro, restas via per la E-kulturo

Miguel Fernández,

Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA

Baldur


Eble iu demandas sin de kie venas
ĉi trio aŭ triptikoj el triversaj strofoj
kun neregulaj metriko kaj rimoj, eble foje eĉ sen ili.

Mi ŝuldas ilin al poeto el Islando,
verkisto en la islanda kaj Esperanto,
aŭtoro de vivo riĉa kaj serena, plena je arto kaj saĝo.

Kiel bona islandano, li ne havas familian nomon.
Li nomiĝas Baldur Ragnarsson, kio en lia lingvo klare signifas,
senplie, Baldur, la filo de Ragnar.

[El la poemaro *Brulvunde*, eld. Espero, 2017] Jorge Camacho

2019, JARO DE FEDERICO GARCÍA LORCA EN LA MADRIDA REGIONO



En 2019, la Madrida Regiono sole-
nos la venon de la granada poeto
Federico García Lorca al Madrido
kaj al la Studenta Restadejo per
diversaj aranĝoj, kiel internacia
kongreso, teatraĵoj, koncertoj kaj
ekspozicioj. Ni madridaj esperan-
tistoj ne volus sidi margene de tiu
kultura eventaro kaj do pretas
demarksi por ke la esperantigitaj
verkoj de la universala granadano
iel estu konataj de neesperantistoj
tiukadre. Miaflanke, kiel multaj el
vi scias, jam de longe mi preparas
grandan komentitan poem-
antologion pri La Generacio de
1927, unu el kies plej renomaj
membroj estis la aŭtoro de i.a. Ci-
gana romancaro kaj Sanga nupto.
Por kontribui jam de nun al la Jaro
de Federico García Lorca, jen mi
specimene aperigas en Boletín
priajn fragmentojn de la manus-
kripto de La Generacio de 1927:

La dudeksepa-anoj elstare kultivis kaj renovigis la romancon kaj brile pliriĉigis la tiel nomatan *Novan romancaron*. El ili ĉiuj, la universala granadano Federico García Lorca realigis la plej eminentan rekreon de la lirikaj valoroj de tiu ĝenro. En sia *Cigana romancaro (Romancero gitano)*, la poeto frate kantas la mondon de la ciganoj, la mondon de l' o natura, pura, praa, libera... fronte al la mondo de la 'civilgardianoj, kiun li identigas kun l' o artefarita, artifika, kruela, kateniga, subprema, senhomeciga, nuntempa... kaj levas la ciganan universon al la kategorio de moderna mito samforta kiel la grandaj klasikaj mitoj.

'civilgardianoj: membroj de hispana ĝendarmaro nomata Guardia Civil [Civilgardio]. (Fernando de Diego).

Multajn el la romanoj ĉi-kolektaj Federico deklame kaj gazete diskonigis antaŭ ol ili aperis libroforme. Kiel ĵus komentite, en 1927, kadre de la tricentjara datreveno de la morto de Gongoro, la dudeksepa-anoj organizis diversajn aranĝojn. Unu el tiuj –kiu, fakte signis la naskiĝon de la grupo– havis lokon en la Ateneo de Sevilo. Tie Lorca deklamis kelkajn el siaj ciganaj romanoj. La spektantoj ĉe la sevila Ateneo svingis la poŝtukojn, kaj la poeto Adriano del Valle, omaĝe ĵetis al Lorca surplanken siajn veŝton, kolumon kaj kravaton.

Unu jaron poste, en 1928, vidis la lumon la poemlibro *Cigana romancaro*. La sukceso estis fulma kaj tiuepoke sen-egala. Lorca renomiĝis naci-skale kiel eminenta poeto. La popolo recitis liajn poemojn, intelektuloj kaj fakuloj deklaris sin envultitaj de la Lorca'aj kreaĵoj. Laŭ trafa aserto de F. de Diego en la juvela enkonduko al sia majstra redono de *Romancero gitano*, Federico García Lorca “atingis per siaj romanoj kion nur la elektitoj de la dioj gustumas: la unu-animan aplaŭdon de ĉiuj tavoloj de tuta popolo”.

La unua eldono de *Cigana romancaro* elĉerpiĝis en kelkaj monatoj. Ses pliaj eldonoj aperis en 1929, 1933, 1935 kaj 1936. Nur malmultaj poemaroj en la historio de la hispana poezio konis tiel enorman sukceson.

Ĉi-verke, la universala hispano atingis propran, neforgeseblan, unikan lingvo-uzon; ĉi-verke kulminis la Lorca'a kunfando de klerulaj kun popolaj ŝatoj; ĉi-verke, poezia strukturo fontinta en la hispana mezepoko pruvis sin mirinda ujo kapabla por harmoniigo de skemoj propraj al popolaj kantoj kaj koploj kun la rafinita eleganteco de aŭdace sparkaj gongorismaj tropoj kaj kun la sonĝeska neracieco de la plej avangarda el la tiamaj skoloj: surrealismo. Tamen ĉio ĉi tute ne dampas sed, male, potencigas la vibraĵon fortan, pasian, homecplenan, senpere kor-trafan, de la Lorca'aj romanoj.

(...)

La poemo, per kiu mi ilustras la gravecon de la romano ĉe Lorca kaj la altajn pintojn, kiujn li atingis tiu-ĝenre, ne apartenas al la kolekto *Cigana romancaro*, sed konsistigas la lirikan parton de la dramo (eble, pli trafe dirite, tragedio) *Sanga nupto*.

Por Federico la teatro estas drama poezio, kaj, samkiel en liaj poemoj ne malofte spureblas dramaj elementoj, en lia teatro, kune kun la prozo –ĝenerale, la pleja parto– kunvivas versoj, kutime esencaj por substreki la dramecon de multaj situacioj.

Sanga nupto premieris en Madrido la 8an de marto 1933. La prezentado konstituis la unuan grandan sukceson de Lorca kiel dramatugo. Li fundamentis sian tragedion sur ĵurnale aperinta informo, kiu, transplantita de li sur la scenejon, ricevis jenan aspekton: en vilaĝo de la provinco Almerio, kadre de nupta festeno, la spozino² fuĝis kun sia eksa fianĉo, Leonardo (la sola drama persono kun propra nomo en la listo de la personaro en ĉi verko). Kune kun kelkaj homoj, la spozo postkuras la fuĝintojn kaj trafas ilin en arbaro. La spozo kaj Leonardo batalas tranĉile kaj, rezulte de tio, ili ambaŭ mortas.

Sanga nupto prezentas la surscenejan plastikigon de la universo lirike bildigita en *Cigana romancaro*: samaj geografio, objektoj, pasioj, sama la fakto, ke la amo ne povas realiĝi, sama la batalo kontraŭ la destinon, sama la morto kaj la luno kiel elementoj kaj simboloj de fatalo, kiel personoj, kiuj, respektive, murdas kaj helpas la morton por ke tiu efektivigu la murdon...

En 1986 mi entreprenis la esperantigon de ĉi verko. La plejmulton el la problemoj, kiun estigas la transpono de la Lorca'aj versoj en nian lingvon, jam antaŭe majstre solvis Fernando de Diego. Mi studis liajn solvojn. Mi ilin ensorbis kaj aplikis al mia laboro. Tamen la oksilabojn de la romanoj en ĉi dramo mi ne redonis per kvartrokeoj. Mi deziris kiel eble plej fidele reprodukti la sonorajn, la sorĉajn, la ebriigan bunton de la Lorca'aj versoj. Mi iel 'radiografiis' la ritman skemon de la originalo –kie kunekzistas komenc-, mez-, fin- kaj kvar-trokeaj oksilaboj– kaj penis reprodukti ĝin kaj provis ĝian funkciadon en Esperanto.

Ni vidu la romancon pri la luno. Ni loku nin ene de la dramo (de la tragedio). Ĝuste en la unua sceno de la tria akto, en la alnomata *Sceno pri la arbaro*, kie okazos la batalo de la spozo kontraŭ Leonardon kaj la morto de ambaŭ. La luno aperas en helaĵo ĉe la maldekstra flanko. La luno estas juna hakisto kun blanka vizaĝo. La scenejo ricevas vivan, bluan brilegon. Jen parolas la luno:

Ronda cigneto ĉe rojoj,
okulo de katedraloj,
falsa aŭror' sur folioj
estas mi; ne eblas savo!
Kiu gvatas? Kiu ĝemas
ĉe la veprejo de l' valo?
La lun' forlasas tranĉilon
en la aer' de l' arbaro,
gvatulon plumban celantan
iĝi nun dolor' de sango.
Min lasu enen! Mi frostas
pro la vitroj kaj fasadoj!
Tegmentojn ovru kaj brustojn,
kie trovos mi la varmon!
Estas froste! Miaj cindroj
el duondormaj metaloj

²*spoz(in)o*: vir(in)o edz(in)iĝonta aŭ ĵus edz(in)iĝinta. (*Neologisma glosaro*).

³Federico García Lorca, *Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba*, en traduko de Miguel Fernández, n-ro 23 de la kolekto Oriento-Okcidento, de UEA, eld. Ediciones La Misma, Madrido, 1987

serĉas de l' fajro la kreston
tra la montoj kaj la stratoj.
Sed min rajdigas la neĝo
sur sia dorso el jaspo,
kaj inundas min la kruda
malvarma baseno-akvo.

Nu, certe havos ĉi-nokte
miaj vangoj ruĝan sangon
kaj la junkoj grupiĝintaj
ĉe la larĝaj aer-plandoj.
For la ombroj kaj embuskoj
ebligantaj la eskapon!
Mi volas nun enbrustiĝi
por min vigligi per varmo!
Varman hom-koron al mi,
kapablan sur la montaron
mia-brustan disverŝiĝi!
Enlason jam, ve, enlason!

(Al la branĉoj)

Ombroj jam for! Lun-radioj
devas trafi ĉiujn flankojn;
tuŝu la trunkojn obskurajn
klara lirlo el helaĵoj,
ke ĉi-nokte havu certe
miaj vangoj ruĝan sangon
kaj la junkoj grupiĝintaj
ĉe la larĝaj aer-plandoj.

Kiu gvatas? For, mi diras!
Ne! Nun ne eblas eskapo!
Brilos per mi diamante,
iel febre, la ĉevalo.

(Malaperas inter la trunkoj kaj sursceneje restariĝas la komenca obskuro. Envenas nud-piede ALMOZULINO tute envolvita en subtilaj malhele verdaj drapoj. Apenaŭ videblu ŝia vizaĝo inter la faldoj. Ĉi persono ne aperas en la listo de la personaro.)

Ĉi persono estas la morto, kiu plenumos la murdojn kun la helpo de la luno.

Miguel Fernández

ĴAKU ŜIRAI, LA JAPANA BRIGADANO



Aferoj pri kiuj
Vi
neniam legos en
Enciklopedio

Dum la hispana civila milito (1936-1939) grupo de milit-voluntuloj, kiuj atingis la nombron 60,000, devenintaj el 54 landoj luktis en Hispanio favore al la Respublika Registaro. Ili estis la Internaciaj Brigadoj. La plej granda kaj organizita demarŝo favore al la kreo de ĉi tiu volontula armeo komenciĝis en Septembro 1936, kun la apogo ĉefe

de la komunismaj partioj de Sovet-Unuiĝo kaj Francio. Tamen, la rekrutado okazis en la tuta mondo kaj tiel en Hispanion venis ne nur komunistoj, sed ankaŭ progresemuloj el ĉiuj politikaj tendencoj kun la ĉefa celo lukti kontraŭ la kreskanta faŝismo en Eŭropo, reprezentata de la hitlera kaj musolina reĝimoj. El tiuj 60,000 voluntuloj preskaŭ 10,000 mortis.

La brigadanoj kombatis unufoje en la defendo de Madrido, komence de novembro 1936, sed ili ankaŭ ludis gravan rolon en aliaj bataloj ĉe Jaramo, Gvadalaharo, Bruneto, Belĉito kaj dum la batalo de la rivero Ebro. La brigadanoj forlasis Hispanion en Septembro de 1938, sekve al interkonsento ĉe la Komitato por la Ne-Interveno, kiu decidis la forigon de ĉiuj eksterlandaj trupoj el Hispanio.

Kiel dirite, brigadanoj venis el pli ol 50 landoj en la tuta mondo. La plejmulto el ili estis francoj, aliaj gravaj kontingentoj venis el Germanio (kontraŭ-naziaj batalantoj), Aŭstrio, Italio, Britio, Usono, Jugoslavio kaj eĉ Ĉinio. Sed ĉi-foje mi parolos pri la sola japana brigadano kiu luktis en Hispanio kadre de la Internaciaj Brigadoj: Ĵaku Ŝirai.

Komence estas necese klarigi kial paroli pri ĉi tiu japana soldato en esperantista revuo. Nu, antaŭ kelkaj monatoj mi trovis la apudan foton ĉe interreta aŭkci-vendejo kaj ĝi vekis mian intereson kaj kuriozemon. Ĵaku Ŝirai luktis ene de la usona brigado “Abraham Lincoln”, kie ankaŭ ariĝis aliaj ne-usonaj soldatoj, kiel filipinoj kaj kubanoj. Mi kontaktis kun japana universitata profesoro de la Universitato Ryukoku en Kioto, kiu esploris pri ĉi tiu japana soldato kaj li diris al mi, ke Ŝirai naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1900. Li kreskis orfe en la urbo Hakodate, akceptita ĉe monaĥejo. Hakodate estas havena urbo, tiel Ŝirai decidis jam infan-aĝe fariĝi maristo kaj foriri el tiu urbo kaj el ĝiaj teruraj vivo-kondiĉoj. Li plenumis tiun revon 17-jaraĝe kiam li sukcesis elmigri en Usonon ene de ŝipo.

Jam en Usono li konatiĝis kun Tojosaburo Sekii, eksa japana maristo, membro de la komunisma partio de Usono kiu helpis lin dum liaj unuaj jaroj kiel ne-leĝa enmigranto en Usono. Ĵaku Ŝirai ofte ĉeestis renkontiĝojn kaj kunvenojn de la komunisma partio kaj tie ankaŭ rilatiĝis kun la granda kolonio de japanoj en la urbo Novjorko. Li eklaboris ĉe japana restoracio kiel kuiristo, helpita de sia amiko Sekki, kiu estis respondeculo de la sindikato de kuiristoj. Tie li konis ankaŭ hispanon nomita Roberto, enmigrinto el Asturio. Roberto parolis al Ŝirai pri la laborista ribelo en Asturio dum la jaro 1934, tiu estis la unua kontakto de Ŝirai kun la politika vivo en Hispanio

En la monato Septembro 1936, laŭ decido de la Tria Internacio, ĉiuj komunismaj partioj en la mondo devis favorigi la rekrutadon de volontuloj por lukti kontraŭ la faŝismo en Hispanio. En Usono krome, la *American Friends of Spanish Democracy* (Amerika Amikaro de la Hispana Demokratio) sendis ambulancojn kaj medikamentojn en Hispanion. Kvankam la deziro de Ŝirai estis lukti en Hispanio, lia persona situacio en Usono kiel ne-leĝa enmigranto, malfaciligis la aferon, pro la fakto, ke Usono deklaris sin tute neŭtrala en la hispana civila milito. Malgraŭ tio, Ŝirai, helpita de komunismaj amikoj, aliĝis al la ĵus kreita Bataliono “Abraham Lincoln”, formita de usonaj volontuloj kaj de aliaj landoj. La komunisma partio de Usono ne permesis al lia amiko Sekii la aliĝon, pro la fakto ke li, kiel leĝa enmigranto, povus partopreni en kampanjon kontraŭ la milita temo Japanio.

La Komunisma Partio de Usono havigis cent volontulojn al la nova brigado, inter ili Ŝirai. Ili ricevis elementan militistan preparon, ĉefe temis pri politikaj prelegoj en novjorka teatro. Pro la deklarita neŭtraleco de Usono la ŝipo transportanta la usonajn volontulojn ne povis rekte vojaĝi en Hispanion, do ili elŝipiĝis en la franca haveno Le Havre. El tiu urbo la usonaj volontuloj marŝis en Parizon, kie sidejis la internacia rekrut-centro de la Internaciaj Brigadoj. Post tiu oficiala aliĝo Ŝirai kaj la ceteraj kunuloj vojaĝis trajne en Perpinjanon la 3-an de januaro 1937. La socialisma registaro de Francio, gvidata de Leon Blum, publike apogis la respublikan registaron, tamen la Komitato de Ne-Interveno malpermesis la eniron de eksterlandaj volontuloj en Hispanion el Francio. Do, preskaŭ kaŝitaj, la usonaj volontuloj eniris en Katalunion per kamionoj ĝis la urbo Taragono kaj el tie per-trajne ĝis la urbo Albaceto, kie sidejis la oficiala kazerne de la Internaciaj Brigadoj.

Ŝirai alvenis en Albaceton la 8-an de februaro 1937, tie la brigadestro André Marty, franca politikisto, bonvenigis ilin, tamen la bonvena parolado okazis en la franca lingvo kaj la usonanoj, ankaŭ Ŝirai, komprenis nenion. Krome, la plejmulto el la membroj de la usona brigado ne posedis militajn spertojn, en Novjorko oni instruis ilin nur paradi, sed ĉi tio estas tute sen-utila okaze de militaj operacioj. Tiel, la unua agado en Albacete estis ricevi minimuman militan sperton, sed denove la lingva barilo aperis, ĉar la instruantoj parolis kaj ordonis en la franca lingvo kaj la usonanoj komprenis nenion.

En Albaceto fondiĝis oficiale la usona brigado “Abraham Lincoln” al kiu apartenis 500 soldatoj, sen distingo de rasoj, do, tie estis blankuloj, nigrujoj, judoj, hispanoj kaj ununura azi-devenulo: Ĵaku Ŝirai. Laŭ milit-esploristoj la brigado “Abraham Lincoln” estis la unua usona militista trupo kie ekzistis tuta racia integriĝo kaj tie estris la unua nigr-haŭta oficiro. Dum tiuj unuaj tagoj en Albaceto oni decidis la enkadrigon de ĉiuj membroj en unu aŭ alian sekcion. La brigadestro decidis, ke Ĵaku Ŝirai estus la kuiristo de la bataliono, oni konsideris, ke se li estis kuiristo en la ekster-armea vivo, li estus rapida kaj lerta rilate la disdonadon de manĝaĵoj.

Tamen Ŝirai protestis. Li sciigis, ke li decidis veni en Hispanion por lukti kontraŭ la faŝistoj, ne por prepari manĝaĵojn. Pro tio, la komandanto rajtigis al li, krom labori kiel kuiristo, agadi ankaŭ ĉe la maŝinpafila kompanio. En sia elementa angla lingvo Ĵaku Ŝirai protestis: *“No kitchen, fight fascists, no more kitchen”* (Ne kuirejo, lukti kontraŭ faŝistojn, ne plia kuirejo). La Doktoro William Pike, sanitara respondeculo de la brigado kaj voluntulo de la *Medical Bureau to Aid Spanish Refugees* persvadis lin per la argumento, ke la soldatoj povas lukti nur se ili ricevas bonajn manĝaĵojn. Ŝirai akceptis, tiam li respondis: *“When the big fight comes, I’ll leave the kitchen. I got a good Russian rifle and I’m going to use it”* (Kiam la grandaj kombatoj alvenos mi forlasos la kuirejon. Mi havas bonan rusan pafilon kaj mi estas preta uzi ĝin).

Dum kelkaj tagoj la usona brigado luktis ĉirkaŭ Madrido. La defendo de la hispana ĉefurbo estis gravega por la hispana respubliko, pro la fakto ke la eniro de la naciismaj trupoj en Madridon estus ne-eltenebla bato por la Respubliko. Dum la monato julio 1937 la respublika armeo decidis ekigi atakon en la madrida vilaĝo Bruneto kun la celo eviti naciismajn atakojn kontraŭ Madrido en la nordo de la urbo. La 8-an de julio 1937 Ŝirai estis ene de tranĉeo kiam kamiono kun nutro-provizoj haltiĝis meze de la batal-kampo. Ŝirai decidis eliri el la tranĉeo por helpi la malblokigon de tiu kamiono kiu transportis necesajn por-vivaĵojn por la trupo. Eksploda kuglo atingis la kapon de Ŝirai kiu mortis fulmine.

Kiel dirite, hazarda eltrovo de fotografiaĵo de Ŝirai apud kelkaj kun-armeanoj surprizigis min antaŭ kelkaj monatoj, pro la fakto, ke sur la fotografiaĵo aperas enskribo en esperanto kun la jena teksto:

Unu japano, Ĵaku Ŝirai, vivanta en Usono partoprenis la hispanan civilan militon en la Rinkan Kompanio de la Internaciaj Brigadoj. He mortis la 11-an de julio de 1937 en Brunete, proksime al Madrido.

Ĉu Ĵaku Ŝirai estis esperantisto? Por solvi ĉi tiun aferon mi demandis tion rekte al la profesoro Keishi Yasuda kiu verkis tezon antaŭ kelkaj jaroj pri Ĵaku Ŝirai. Li surprizigis pro la esperant-lingva enskribo de la fotografiaĵo, tamen li diris, ke Ŝirai neniam ĉeestis lernejon kaj lia kono de lingvoj nur rilatis al la japana, ĉar eĉ dum sia vivo en Usono li ne kapablis esprimi sin perfekte per la angla lingvo. Tiel, post la morto de la japana soldato, David Martin, kun-armeano, sub la pseŭdonimo Ludwig D verkis poemon honore al li kaj ene de ĝi la aŭtoro diras:

<i>His funny pidgin English,</i>	<i>Lia gaja piĝina angla lingvo,</i>
<i>His smiling eyes</i>	<i>liaj ridetemaj okuloj</i>
<i>And his brave heart</i>	<i>Kaj lia brava koro</i>
<i>Made him loved as a brother.</i>	<i>Igis lin esti amata kiel frato.</i>

Do, oni povas aserti, ke li neniam parolis Esperanton, sed, verdire iu tre proksima al li estis esperantisto. Kiu li estis? Kiu estis la aŭtoro de la enskribo sur la fotografiaĵo? Neniu persona ŝpuro li lasis sur ĝi, tamen el la skribaĵo oni povas diveni jenon:

- Li estis usonano. Li erare uzas la pronomon “He” anstataŭ “Li” en la frazo *He mortis la 11-an...*
- Li estis membro de la Internaciaj Brigadoj, ĉar li mencias datumon kiun mi trovis sur neniu alia dokumento, tio estas, ke Ŝirai apartenis al Kompanio Rink de la Internaciaj Brigadoj.
- Li ne estis apud Ŝirai dum sia lasta kombato, pro la fakto, ke li eraras pri la ĝusta dato de la morto de la japana soldato. Erare li mencias la 11-an de julio anstataŭ la 8-an.
- La aŭtoro de la enskribo bone regas la lingvon, malgraŭ la ne-ĝusta uzo de la vortoj “vivanta en Usono”, laŭvorta traduko de la angla-lingva “living in USA”, anstataŭ la pli ĝusta konstruo “loĝanta en Usono”.

Mia lasta kontakto por koni pli detale la historion de Ĵaku Ŝirai estis esploristo de la Brigado “Abraham Lincoln”, historia epizodo en la usona historio pri kiu ankoraŭ oni verkas de tempo al tempo seriozajn studojn, pro la fakto, ke post la fino de la milito kaj la reveno de la brigadistoj multaj el ili estis enprizonigitaj pro la akuzo estis komunistoj. Bedaŭrinde, kvankam la figuro de Ŝirai ankoraŭ estas memorata de tiuj brigadanoj kiuj ankoraŭ vivas, neniu el ili memoris pri la esperantisteco de apudulo de nia japana heroo.

Do, pri Ŝirai nenio estos trovebla en niaj enciklopedioj, tamen estas interese diskonigi lian historion kaj la sencon de lia vivo.

J.M.R.H.



ALIĜILO por la
78-a Hispana Esperanto-kongreso
 01-a ĝis 05-a de majo 2019
Malago, Hispanio

ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj
 sendi apartan aliĝilon al retadreso:
ifef2019@esperanto-andalucia.info
marilo1950@hotmail.es

LKK- adreso:

Andaluzia Esperanto Unuiĝo
 strato Ánfora, 6-5º D, 29013-Malago (Hispanio)

Kongresa ret-paĝo: <https://esperanto-andalucia.info>

Familia nomo		Persona nomo	
Adreso			
Telefono:		Ret-adreso:	
HEF-AEU-ano : jes ne viro virino		(forigu ne taŭgajn)	
Mi antaŭpagas jenan sumon :		Eŭro	
Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM			
Kotizoj en Eŭro	Ĝis 31.12.18	Poste	Sumo
A) HEF aŭ AEU-membro	35	55	
B) Ne membro	50	65	
C) Juna (1) membro de HEF, AEU kaj familiano	20	35	
D) Juna (1) nemembro, familiano	25	45	
E) Infano kaj studento ĝis 24 jaraĝa	5	5	
Ĉambro-perado po persono	5	5	
V1: Urbovizitado – Malago (piedire)	3	3	
V2: Urbovizitado – Malago, Botanika ĝardeno , per buso	8	8	
D1: Duontaga ekskurso: Zafarraya , kun faka vizito	15	15	
D2: Duontaga ekskurso: Antequera	12	12	
T1: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Ronda (*)	25	25	
T2: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Kordovo (*)	30	30	
A1: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Granado (*)	42	42	
Tranoktado laŭ ĉambro mendilo (minimume unu nokto)			
Aldonaj noktoj post la 5-a de majo (5€/nokte)			
Postkongreso: Norda Maroko (**)	unulita ĉ.	dulita ĉ.	
Vendredo, 10.05 Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan	255	225	
Sabato, 11.05 Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan			
Dimanĉo, 12.05 Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga			
Je aliĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranoktadon laŭ elekto por minimume unu nokto. (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervo). (**) Prioritaton por postkongreso havas la IFEF-kongresanoj. Signu la elektitajn servojn			
Entute :			
Pagita sumo :			
Restanta pago :			

(*) Pikniko inkluzivita kaze de kompleta pensio, alie devas esti aparte mendita.